


LA JUNIA VIVO



REDAKCIO KAJ
ADMINISTRADO:
LIMMEN (N. H.)
NEDERLANDO

Ĝironumero 209354
Nederl.

JARABONO:
NEDERLANDO:
0.80 GULDENO
ALIAJ LANDOJ:

16 Fr. Fr.; 0.70 Dol.; 2.1 Sv. Fr.

MONATA ORGANO POR LA JUNULARO KAJ KOMENCANTOJ

Por progresintoj.

El: Gazetartikoloj el „La Esperantisto 1892”.

Ĉu ni progresas?

Ni iras antaŭen regule. La celo lumas al ni ĉiam tiu sama, kaj, ĉu hodiaŭ la cirkonstancoj estas pli favoraj, morgaŭ — malpli kaj postmorgaŭ denove pli — la veraj amikoj de nia ideo laboras trankvile kaj kun egala animo. De flanka bruo kaj de ekstera ŝajno neniel dependas la sorto de nia afero.

Ni devas brui, kiom ni povas, ni devas peni, kiom ni povas, krei ĉiam novajn faktojn por la okulo, ĉar... la blinda amaso tion ĉi amas, kaj povas esti altirata la plej bone per tia maniero (la fakto, ke ni ne havas ankoraŭ la eblon por sufiĉe brui kaj fari reklamon, multe malhelpas al ni en la altirado de la amasoj); sed por ni mem tiu ĉi bruo aŭ silento ne povas esti mezurilo de nia progresado aŭ starado. Plej granda bruo kaj ekstera brilo povas kovri sub si objekton tute senfundamentan, putran, mortantan aŭ jam mortintan, dum kontraŭe, nokta mallumo kaj morta silento povas kovri sub si objekton, regule kaj energie kreskantan kaj disvolviĝantan. Ni lasu al la amasoj, taksu la aperojn laŭ ilia ekstera brilo; se la amaso nun adoras ian luman meteoron, nenio ĝin detenos post kelkaj minutoj tute forgesi pri la meteoro, kiam tiu ĉi perdos sian malveran lumegon; se la amaso hodiaŭ silente rigardas aferon, malrapide, sed konstante disvolviĝantan, tiu ĉi ne detenos la amason morgaŭ aliĝi al la afero nerimarkite kaj tiri el

ĝi utilon. Ni lasu al la amasoj juĝi la faktojn laŭ ilia ŝajno ; kiam ni mem volas scii, ĉu nia afero progresas aŭ ne, ni devas esplori la faktojn internajn.

Gazetartikoloj el aliaj gazetoj.

Nekrologo pri W. H. Trompeter (1901)

El Essen en Germanujo mi ricevis la tre malĝojan sciigon, ke la 7-an de novembro, post longa, pacience elportata suferado, tie mortis en la aĝo de 63 jaroj W. H. Trompeter . . .

W. H. Trompeter mortis ! Neatendinte kaj tiom pli ŝarĝe trafis min tiu ĉi funebra sciigo ! Jam longan tempon mi havis de li nenian leteron ; mi pensis, ke li estas ankoraŭ en vojaĝoj, ke li estas tre okupita . . . kaj dume li malfacile suferadis kaj bataladis kun la morto.

Hieraŭ mi skribis al li leteron ; sed antaŭ ol mi havis la tempon por enĵeti la leteron en la poŝtan keston, mi ricevis de la familio de Trompeter la funebran sciigon. Kaj mi devis disŝiri mian leteron kaj anstataŭ ĝi mi sendis al la familio de la mortinto leteron kondolencan en mia nomo kaj en la nomo de ĉiuj niaj amikoj esperantistaj.

Mi ne rakontos nun pri la signifo, kiun la mortinto havis por nia afero ; mi ne raportas pri ĉiuj liaj meritoj por nia afero. Ĉiuj esperantistoj scias tion ĉi tre bone, kaj sendube ili ĉiuj kune kun mi sentas la tutan perdon, kiu nin atingis. Al la novaj esperantistoj mi diros nur mallonge, ke sen W. H. Trompeter nia afero nun eble jam delonge ne ekzistus. Antaŭ 10 jaroj la stato de nia tiam ankoraŭ tre juna afero estis tre malbona ; ekzistis neniam rimedoj, por ion fari, kaj nia sola tiama gazeto devis ĉesi eliradi. Tiam aperis Trompeter kaj, kvankam mem homo ne tre riĉa, prenis sur sin la tutan finanĉan ŝarĝon de nia gazeto, ne sole prenis sur sin ĉiujn elspezojn, sed difinis ankaŭ el sia poŝto salajron por la redaktoro, kaj sen bruado, sen sinlaŭdado, li per siaj propraj rimedoj en la daŭro de tri jaroj kondukis la gazeton ĝis tiu momento, kiam ĝi ekpovis jam stari sur propraj piedoj. Li ne rifuzis sian helpon ankaŭ poste, kiam s-ro Gernet komencis eldonadi novan esperantan gazeton. Per lia mono ankaŭ aperis siatempe kelkaj tre gravaj libroj,

al kiuj li, pro celo de propagando, difinis tiel malgrandan koston, ke la enspezoj ne povis kovri eĉ la duonon de la elspezoj. Ĉion li faradis sen bruo, modeste kaj silente, tiel ke la plimulto de esperantistoj eĉ nenion sciis pri liaj grandaj oferoj.

Se nia afero ne mortis, sed vivas kaj floras, tio ĉi estas en tre granda parto merito de la mortinto. Ripozu en paco, kara kaj multe merita amiko de nia afero! La esperantistoj neniam forgesos vian nomon. En la historio de Esperanto al vi apartenas ĉiam la plej grava, neniam elŝirebla, neniam elstrekebla paĝo!

Pri la kongreso (1905)

Sed la plej grava, kion ni ĉiuj devas kunporti kun ni al la kongreso, estas paco kaj reciproka amo kaj toleromo. Se ni deziras, ke nia kongreso ne faru fiaskon, ni devas antaŭ ĉio aperi al la kongreso ĉiuj kiel fratoj, entuziasme kaj sindone ligitaj per unu amata ideo, kiu devas esti por ni, almenaŭ en la tagoj de la kongreso, pli sankta ol ĉiuj diversaj personaj ambicioj, kalkuloj, kapricoj aŭ opinioj. Ĉiu el ni kredeble havos la eblon esprimi en la kongresio sian opinion pri tiu aŭ alia punkto, sed ĉiu devas tion ĉi fari trankvile kaj senpasje kaj ne batali kontraŭ la decidoj de la plimulto; neniu devas peni altrudi sian opinion aŭ volon, neniu devas koleri, se lia opinio ne estos akceptita. Se troviĝos inter ni persono, kiu profanas nian feston per persona ambicio aŭ per semado de malpaco, ni ĉiuj deturnos nin de li, se li eĉ estas homo de plej grandaj meritoj.

El: Traktaĵoj.

Esperanto kaj Volapük

... Unuanimeco estas afero tre laŭdinda, sed ĝi ne devas esti blinda, ĉar tiam ĝi jam estas simple obstineco kaj donas rezultojn tute aliajn. La frazo: „concordia parvae res crescunt, discordia maximae dilabuntur” (Latina proverbo: per konkordo kreskas malgrandaj aferoj, sed per malkonkordo pereas eĉ la plej grandaj) per si mem estas tre bela kaj bona, sed la sola frazo ne kondukos al

bono ; kaj se vi decidis iri unuanime sur la vojo, rigardu antaŭ ĉio, ĉu tiu ĉi vojo ne kondukas vin de via celo, anstataŭ alkonduki al ĝi; ĉar ĉe unuanimeco sur tia vojo ne „kreskas malgrandaj aferoj”, sed „pereas eĉ la plej grandaj”.

Se ni konscias, ke ni estas sur malvera vojo, ni devas deiri de ĝi, por transiri sur la veran. Tiuj volapükistoj, kiuj kredas, ke Volapük estas vojo vera, devas resti al ĝi fidelaj ; tiuj, kiuj ne scias kion elekti, povas labori egale por Volapük kaj Esperanto (ĉar pli bone estos se ni havus du lingvojn tutmondajn, ol se ni havos nenion) ; sed tiuj, kiuj defendas Volapük'on kaj batalas kontraŭ Esperanto nur tial ke ili timas esti nomataj renegantoj, montras per tio ĉi, ke ili ne havas ideon pri la afero kaj memorigas tiujn obstinulojn de la bona malnova tempo, kiuj el estimo *al la tradicio* batalis kontraŭ la enkonduko de vapore, aŭ tiajn strangulojn, kiuj volus batali kontraŭ la telefono, timante fariĝi sendankaj al memoro de la elpensintoj de la telegrafo.

Preĝo sub la Verda Standardo.

Al Vi, ho potenca senkorpa mistero,
 Fortego, la mondon reganta,
 Al Vi, granda fonto de l' amo kaj vero
 Kaj fonto de vivo konstanta,
 Al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas,
 Sed ĉiuj egale en koro Vin sentas,
 Al Vi, kiu kreas, al Vi, kiu reĝas,
 Hodiaŭ ni preĝas.

Al Vi ni ne venas kun kredo nacia,
 Kun dogmoj de blinda fervoro :
 Silentas nun ĉiu disput' religia
 Kaj regas nur kredo de koro.
 Kun ĝi, kiu estas ĉe ĉiuj egala,
 Kun ĝi, la plej vera, sen trudo batala,
 Ni staras nun, filoj de l' tuta homaro
 Ĉe Via altaro.

Homaron Vi kreis perfekte kaj bele,
 Sed ĝi sin dividis batale ;
 Popolo popolon atakas kruele,
 Frat' fraton atakas ŝakale.
 Ho, kiu ajn estas Vi, forto mistera,
 Aŭskultu la voĉon de l' preĝo sincera,
 Redonu la pacon al la infanaro
 De l' granda homaro !

Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali,
 Por reunuigi l' homaron.
 Subtenu nin, Forto, ne lasu nin fali,
 Sed lasu nin venki la baron ;
 Donacu Vi benon al nia laboro,
 Donacu Vi forton al nia fervoro,
 Ke ĉiam ni kontraŭ atakoj sovaĝaj
 Ni tenu kuraĝaj.

La verdan standardon tre alte ni tenos ;
 Ĝi signas la bonon kaj belon.
 La Forto mistera de l' mondo nin benos,
 Kaj nian atingos ni celon.
 Ni inter popoloj la murojn detruos,
 Kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos
 Kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero
 Ekregos sur tero.

Kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj,
 Antaŭen kun pacaj armiloj !
 Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj
 Ni ĉiuj de Di' estas filoj,
 Ni ĉiam memoru pri bon' de l' homaro,
 Kaj malgraŭ malhelpoj, sen halto kaj staro
 Al frata la celo ni iru obstine
 Antaŭen, senfine !

KIAL ?

En sia liteto la malgranda Marcelle maltrankvile movas sin. Ne estas la soleco en la malluma nokto, kiu timigas ŝin kaj malhelpas al ŝi ekdormi. Ho ne; en la kapeto de la kompatinda etulino vagas demando, kaj ŝi ne sukcesas trovi respondon.

Ĉi tagmeze okazis la plej terura, kion ili jam longan tempon timis. Al ilia farmejo venis malamikaj soldatoj. Neatendite ili aperis sur la korto. Ŝi ĝuste ludis antaŭ la garbejo, kaj subite ili staris antaŭ ŝi. Ŝi volis forkuri, kaŝi sin pro tiuj teruraj malamikoj, kiuj mortpafas ĉiun, kiun ili renkontas, sed ŝi ne povis. La malamikoj vokas al ŝi, sed ŝi ne komprenas. Kio nun? Angore ŝi kaŝas la vizaĝon en la manetoj kaj tiel aŭskultas tiujn terurajn nekompreneblajn sonojn, kiuj sendube estas malbenoj. Jen, subite ŝi sentas, ke iu levas ŝin. Pro teruro kaj angoro ŝi kriegas. Ho, nun oni certe mortigos ŝin, same kiel tiuj kruelaj malamikoj faris kun tiom multe da aliaj infanoj! Sed . . . kio estas? Jen ŝi subite aŭdas konsolajn vortojn en sia propra lingvo. Sonas strange, neperfekte, sed tamen tiom konfidinde. Ĉi tiu malamiko parolas ŝian propran lingvon, tiu ĉi malamiko estas ordinara homo! Li rakontas al ŝi pri sia propra filneto, kiu estas tiom granda kiom ŝi, kaj li ŝin nomis sia kara etulino.

Poste ili foriris, la malamikoj.

Kaj en la liteto la malgranda Marcelle pensas pri la malamikoj, kiuj estas tute ordinaraj homoj, kiujn ŝi komprenas, kiam ili parolas ŝian lingvon, kiuj ankaŭ havas infanojn kaj amas ilin. Kaj ŝin turmentas la demando: »Kial fakte tiuj homoj estas malamikoj? Kial tiuj ĉi homoj interbatalas? Kial ?«

* * *

Tra la mallumigita urbo bruegas la alarmsirenoj. Aer-atako! — Paniktime la loĝantoj forlasas siajn ĉambrojn kaj rapidas al la kaŝkeloj kaj tranĉeoj por tie serĉi ŝirmon kontraŭ la bombardado, kiu nun sekvas.

Kaj la alproksimiĝanta »malamiko« ĵetas siajn bombojn sur siajn »malamikojn« kaj semas morton kaj detruon en la urbon. Tiam ili malaperas. — La ordono plenumiĝis!

Kaj la loĝantaro forlasas la kaŝejojn por esplori, kio saviĝis. Ĉe la ruinoj de ĉio, kio estis kara al ili, la viktimoj plendas siajn doloregon kaj ĉagrenon kaj senespere demandadas: »Kial ?«

* * *

Serĉante ŝirmon kontraŭ la pafado, preĝante, ke tiu ĉi teruraĵo baldaŭ finiĝu, kaj samtempe timante la atakon, kiu nepre sekvos, la soldatoj kuŝas en la tranĉeo.

Atako! Kun la bajoneto sur la pafilo la »malamikoj« rapidas unu al la alia kaj estiĝas abomena, senpardona batalo de viro kontraŭ viro.

Kiam la batalo finiĝas, la »malamikoj« dum momento vidas unu la alian kiel »homoj«, kaj la pro emocio tremantaj lipoj de la venkinto, same kiel la jam rigidiĝantaj lipoj de la venkito, formas la senesperan demandon: »Kial . . . ?«

* * *

La milit-dio havas sian festenon kaj liaj gastoj estas liaj satelitoj: Malamo, Envio, Regemo, Miskompreno, Rasmalamo, Malfido, Lingvo-diverseco. La timiga societo ĝuas pro la granda sufero, kiu trafis la homaron. Fanfarone la gastiganto parolas pri siaj agoj kaj pri tiuj de siaj gastoj: »Denove ni sukcesis interbataligi la homaron! Denove la homoj, la malsaĝuloj, kiel rabobestoj atakas unu la alian. Denove ni venkis, kaj tiel restos! Kiom longe ni povos malhelpi la interkompreniĝon inter la popoloj, tiom longe ni havos firman lokon sur la tero kaj ni havos influon pri la homoj; tiom longe estos milito; tiom longe ni festos nian sango-feston!«

Kaj la societo diboĉas, ĝi diboĉas karegan, puran, homan sangon, elverŝitan de homa mano!

Kaj sur la tero, sur la bela tero, kie estas loko kaj vivebleco por ĉiu ajn, tondras la kanonoj kaj buĉas la homoj unu la alian kiel fi-insektojn, kaj ili ne scias kial . . . !

* * *

Sed sur tiu sama tero ankoraŭ estas grupo da homoj, kiu ne lasas sin buĉi de la milito-dio. Estas grupo da pacbatalantoj, kaj tra la mallumego de milito kaj perforto ili vidas brili sian celon kaj, kvankam la vojo tien ankoraŭ estas ne-pavimita kaj malfacila, ili kuraĝe iras ĝin.

Estas la Esperantistoj, kiuj restas sur sia posteno por komprenigi la homaron pri la granda idealo. Tiu idealo estas Esperanto, lingvo, apoganta sur idealo, lingvo, kiu devas plifaciligi la interkom-

preniĝon inter la popoloj, kiu ankaŭ povas tion. Ĝi volas kaj povas esti firma bazo, sur kiu ni povas konstrui novan mondon. Mondo, en kiu estos kompreno pri la reciprokaj moroj kaj kutimoj, respekto al la reciprokaj principoj kaj ĉefe: respekto al la Vivo!

Ĉar ili estas certaj, ke tiu mondo devas veni, ili kuraĝe daŭrigas la batalon por esti pretaj, kiam la tempo estos matura.

Ĉu ankaŭ vi, kara leganto, per ĉiuj fortoj helpas en la batalo?

Leerdam (Ned.).

J. K.

7. ENIGMOJ

| | | | |
|---|-----------|----------------------------|----------------------------|
| 1 | | tranĉa, pika | Ŝercu la 8 kvarliterajn |
| 2 | | Eŭropano | vortojn. Legu la 2-ajn li- |
| 3 | | parto de la fingro | terojn de supre malsupren |
| 4 | | konata nomo de fotografilo | kaj vi trovos vorton, kiu |
| 5 | | varmega, pasia | signifas aron da homoj, |
| 6 | | ilo de fiŝkaptisto | kiuj kunvenis por pridis- |
| 7 | | parto de la homa korpo | kuti komunajn demandojn. |
| 8 | | rimedo por gajni | |
| | | premion aŭ monon | Blaricum (Ned.) T.B.B. |

Ni akceptos solvojn ĝis 15 marto. Inter la ĝustaj solvintaj ni lotumos 2 premiojn.

La solvoj el No 4-5.

I. To-lo, lo-ko, ko-to. II. Ro-bo, bo-vo, vo-ko, ko-lo.

La premiojn gajnis s-ro I. Groenveld en Schoorl (Ned.) kaj s-ro J. de Graaf en St. Maartensdyk (Ned.)

La solvo el No 6-7.

Nodo, vEra, koDo, vanE, koRo, aLoo, Algo, iNda, juDo, kapO (= Nederlando).

La premiojn gajnis s-ino De Bruyne—Blesing en Oosthuizen (Ned.) kaj s-ro Peder Nielsen en Hvam (Danujo).

Eble la legantaro de „La Juna Vivo” volas sendi sian juĝon pri jenaj demandoj:

1. Kial tiom multe da gejunuloj el Anglio, Skotlando kaj Kimrio partoprenis en viaj internaciaj junularkunvenoj, kaj tute ne el la nordaj landoj?
2. Kial d-ro Zamenhof estis kontraŭ diskutado?

Ni donacos du belajn librojn al tiuj, kiuj plej bone respondas al unu el la du demandoj.

LA JUNA VIVO EN „LA JUNA VIVO”

Mi kore dankas pro la sendado de „La Juna Vivo”, simbolo de la Zamenhofa idealo. Oh, mi estas tre feliĉa! Per via laŭdinda ago mi vivas inter la veraj pacaj homoj, inter la Zamenhofanoj. Kiom da tagoj mi atendis revivigi mian Esperanto-lingvon!

Sed hodiaŭ mi ne povas sendi la jarkotizon kaj pro tio mi petas al vi ne forgesi min. Mi bedaŭras tion. Eble mi poste povos sendi la monon, kaj tiam mi rememoros vian agadon kaj rekom-pencos ĝin al „La Juna Vivo”. Mi tre deziras ricevi „La Juna Vivo”, por ke mi povu kunvivi kun miaj fratoj-esperantistoj!

Se vi opinias, ke mi estas utila por helpi vin kiel delegito aŭ por iu alia afero, vi nur ordonu. Mi ĝoje plenumos ĉion por vi.

Senfine dankema, Jozefo Marti, Roses, Gerona, Hispanio.

Kun multa ĝojo mi ricevas preskaŭ ĉiumonate vian tre interesan revuon „La Juna Vivo”. En la No de aŭg.-sept. mi vidis, ke vi petas al la junaj gesamideanoj, ke ili pagu por ni la kotizon, ĉar ni ne povas pagi. Jes, tio ĉi estas certa, kaj mi estas tre dankema al vi por la sendado de via revuo kaj mi ankaŭ dankos multege al la samideanoj, kiuj pagos la jarabonon por ni.

Kun kora danko salutas vin kaj restas ĉiam je via dispono via hispana amiko Ramón Molera, Hospital 13, Moyá, Barcelona.

... Kun granda ĝoj-surprizo mi legis en la lasta numero de „La Juna Vivo”, ke s-ro v. d. Schaaf pagis mian abonkotizon!

Hieraŭmatene mi ricevis sciigojn de Justo Estan, per letero de li al sia familio. Laŭ ĝi li bonfartas kaj tre amuzas sin kun siaj samsortanoj. Ankaŭ li esperas la baldaŭan liberigon. Sed kion mi plue rimarkis en la letero, estas ke de temp’ al tempo li malgaj-iĝas pro la belaj rememoroj okazintaj dum la biciklo-veturado tra Eŭropo.

Restas je via dispono,

José M. Bernabeu,

Calossa de Seguro, Alicante, Hispanujo.

Kara eldonantino de „La Juna Vivo”,

Paskon vi donacis al ni tri jarkolektojn de via organo por la junularo. Jam antaŭe ni deziris aboni ĝin, sed pro la nuntempaj malfacilaĵoj en la translima pagado tio ne eblis. Nun ni devas

rakonti al vi, ke via donaco fariĝis por ni valorplena trezoro. Ofte ni tagon post tago laŭtleĝas el la ravaj kajeroj en nia familia rondo. Niaj gepatroj diradas, ke ankaŭ plenkreskuloj profitas multon per tio. Nia patro admiras la altan pedagogian nivelon de preskaŭ ĉiu artikolo. Estis bela ideo de vi, disponigi en via gazeto tiom da spaco al la vivo de la bestoj. Resume: La gazeto estas modela ilo de vera mondkulturo.

Nia kristnaska deziro estas, ke la milita tempo baldaŭ ĉesos kaj neniam revenos. Al vi persone ni deziras feliĉan novan jaron!

Kore salutas vin, Wieland Nordwall, Haidonn Nordwall.

Ĝoje ni memoras la paskan vesperon kun vi!

D-ro Med. A. Nordwall, Norderney, Germanujo.

. . . Spite de la malhelaj teruraj tempoj, Esperanto tre bone sukcesas en Bristol. Je la fino de januaro nia grupo en Bristol festos belan Novjaran vesperon. Ni ludos Esperantajn teatraĵojn. Unu estas la traduko de la Ŝakspira komedio »Songô de Meza Somera Nokto«. La preparado estas ege interesa, vi povas imagi!

Mi treege esperas, ke la milito ĉesos baldaŭ en la nova jaro, por ke alia junulara tendejo okazu la venontan someron. Ni esperu!

Stella Toogood, Horfield, Bristol, Anglujo.

Esperantista libertempo en Tervuren.

Dum la lastaj someraj ferioj multaj Esperantistaj kunvenoj okazis, kies memoro senŝancelige kuraĝigos nin en malesperigaj momentoj.

Mi rakontu iom pri la Internacia Junular-Kunveno en Tervuren apud Bruselo, de 7-14 aŭgusto 1939. Ĝin organizis la vigla nova asocio Tutmonda Junular-Organizo (T.J.O.). Jam pasintjare simila restado okazis en la vilaĝeto Groet (Nederlando).

Nunjare pli bela ankoraŭ estis la sukceso. Multaj gejunuloj kaj plenaĝuloj venis al Tervuren: preskaŭ 400 (antaŭe 200). Deveno internacia, same kiel en Groet, similaj organizaĵoj: lernejoj, utiligitaj kiel dormejoj, salonego kiel kunvenejo, nutrado laŭ flandra kutimo: manĝoj malvarmaj matene kaj tagmeze en la salono, varmaj vespere en hoteloj. Tia organizmaniero ebligas tre malaltan kotizon: 150 fr. fr. (enkalkulite plenan pensionon kaj ekskursojn), sed nur por anoj de T.J.O.

Ravan lokon elektis la organizantoj. La vilaĝo Tervuren (13 km. de Bruselo) kuŝas inter vastaj arbaroj, ĉe kasteloj kun ĉarmegaj

parkoj kaj lagetoj. Niaj gajaj, junaj vokoĵoj, ludkrioj kaj kantoj resonadis tra malnovaj arbaroj. Iam ni vizitis la Kongo-muzeon, kun ĝia aparte loga parko; alian tagon ni pasigis en Bruselo, tra-irante la grandajn stratojn, admirante belegajn ĝardenojn, imponajn konstruaĵojn kaj malnovajn flandr-arkitekturajn domojn. Fine de l' semajno granda ekskurso kondukis nin tra Ardenoj, laŭlonge de la Meuse-a valo, ĝis la franca landlimo.

Sed la plej simplaj kaj profunde fratigaj momentoj estis tiuj en la salono: malsilentaj manĝoj, liberaj konversacioj kaj vespere la ĉiam ŝatataj distraĵoj — danco, kanto, teatraĵetoj. Jam de la unua vespero, post la malfermo de nia ĉiam bonhumora prezidanto, ĉiuj eksentis, ke ĉi tie ni estigas grandan familion. Unu fojon plian la nuntempa miraklo pro la kara lingvo efikis. Kaj ĝis la fino regis fido kaj frateco. Kiel entuziasme ni kunkantis la Esperon kaj nian himnon: la marŝkanto de la junularo.

Sub tia impresio revenis ĉiuj al siaj landoj, la multnombraj Angloj, kaj la Francoj

En Tervuren ni formis la belan projekton organizi en Francujo la kunvenon en la venonta jaro, ĉu antaŭ, ĉu post la Marseille-a Kongreso. Ni esperu!

Ĉiuokaze ni havas ion por fari, gejunuloj! Post tiu aĉa milito la Esperanta movado devas progresi plej potence. Tial ni jam vokas vin: Venu frate al „Tutmonda Junular-Organizo”!

Marcelle Montagnon, instruistino en Evillers.

Meditoj en la lasta vespero de la jaro.

Kiam la jaro finiĝas, ni vole ne vole rerigardas en la pasinta jaro, kaj ni rememoros ĉiajn gajajn kaj malgajajn momentojn.

Rerigardante en la jaron 1939-an ni vidas multe da ĉagreno. Certe, ankaŭ okazis la belega kaj esperiga festo en Tervuren. Sed tuj post ĝi eksplodis la milito, la plej terura okazaĵo, kiu povis trafi nin.

Kiu iam perdis parencon aŭ amikon, kiun li profunde amis, scias, kiom doloriga estas la adiaŭo por ĉiam. — Pro la milito mortas miloj da homoj, kiuj ĉiuj postlasas parencojn kaj amikojn, kiuj funebras ilin. Ĉu ne estas korŝire? Kaj ne nur morton kaŭzas la milito, sed ankaŭ tiom da korpa kaj spirita mizero. Foje kaj refoje ni pensas: Kiom kruelaj estas la homoj! Kial do oni militas? — Sed per tia meditado la mondo ne pliboniĝas. Ni devas agi.

Geamikoj, ĉe la komenco de la nova jaro ni promesu unu la

alian, ke ni de nun vere eklaboros por la paco. Se ni ĉiuj kune, kiel unu granda familio, serioze volas tion, ni certe venkos la militon. Sed — kiam ni volas eklabori por la paco, ni komencu ĉe ni mem. Ni ĉiuj, po unu, kulpas pri la milito! Anstataŭ kritiki aliajn, ni observu nin mem. Nur post kiam ni lernis respekti kaj ami **ĉiujn** homojn, ankaŭ tiujn, kiuj havas alian kredon, ni fariĝos veraj batalantoj por la Paco. Do — ek al la laboro!

Gustumu ĉion iomete, rigardu ĉion iomete, sed vivu por nur unu celo.

N. (Ned.)

Kristnaska Donaco.

Sonoriloj apenaŭ aŭdeble
Velurtone kantadas: „Bim, hom” . . .
Kiom multajn surprizojn promesas
Al etuloj abia arom’!

Dum Kristnaska malluma vespero
For el urbo al vasta kampar’;
Pli proksimen al stel’ radianta
Portu nin kun tintil’, ĉevalpar’!

Inter neĝaj amasoj nin gvidos,
Kiel iam Saĝulojn, anĝel’,
Al infano hodiaŭ naskita
Ĉe arbar’ en glacia kastel’.

Kaj al Li ni donacos nur koron -
La plej karan juvelon sur ter’,
Etan koron, tremantan pro ĝojo,
Kun sur ĝi degelanta neĝer’.

Ludmila J e v s e j e v a.

Helpo al niaj izolitaj geamikoj.

Bets kaj Berta Wit el West-Graaftdijk (Ned.) donacis unu el siaj abonoj al Trinitario Martiner Estan, Calle San Antonio 26, Calossa de Segura, Alicante.

Denove iom da helpo, sed — estas ankoraŭ tiom malmulte. Kaj tiom multege da junaj homoj sopire atendas iom da esperanto-legaĵo. En la rubriko La Juna Vivo en „La Juna Vivo” ni presigis kelkajn el la multaj leteroj, kiujn ni regule ricevas. Ili estas sufiĉe klaraj, el ĉiuj parolas la sama peto: Ne forgesu nin! Geamikoj, ĝis nun „La Juna Vivo” estas nenie malpermesata, ni povas sendi ĝin ĉien. La nura baro estas la mono. Ni denove urĝe petas vian helpon. Se vi persone ne povas donaci abonon, parolu pri tio en la grupo. Se ĉiu grupo donacas unu aŭ kelkajn abonojn, ni denove povas feliĉigi multajn esperantistojn. Multaj el ili vivas en tiom mizeraj cirkonstancoj, kiujn ni ne povas imagi al ni. Ĉu ne estas nia devo almenaŭ iomete gajigi ilin?

Por komencantoj.

La galantoj.

En la plej supra koridoro de la domo, kie mi loĝis, ili staris : tri ruĝbrunaj, argilaj potetoj, plenaj de nigra sablo. Ĉiutage mi kelkfoje preteriris, sed ne multe atentis.

Iun matenon tamen, kiam la suno brilis sur ili, mi vidis en la nigro multe da helverdaj punktetoj. De tiu momento mi rigardis ilin kun ĉiam pli da intereso.

Foje, kiam mi denove staris ĉe la potetoj, mi aŭdis iun tre malfacile kaj mallaŭte suriri la ŝtuparon. Momenton poste diris tremanta voĉo : „Ili fariĝas jam beletaj, ĉu ?” Kaj mi aŭdis murmureti : „Nova vivo . . .”

Estis la avino de la familio, kiu prizorgis ilin, kaj ŝi melankolie rigardis la potetojn. Mi sentis, ke ekzistas malgaja historio pri ili, sed ne kuraĝis demandi. Post momento ŝi diris, montrante al la verdaj plantetoj : „Tiu vidis pli ol mi kaj ankaŭ scias pli. Ili venis el Francio, de tie, kie estis la grandaj batalejoj”.

„El Francio ?”, mi demandis. „Ĉu oni de tie sendis ilin al vi ?”

Neante ŝi movis la grizan kapon. „Mia nepo kunportis ilin, kiam li venis hejmen por libertempi. La unuan kaj . . . la lastan fojon”.

Ŝiaj tremantaj manoj prenis unu el la potetoj, kaj la maljunaj okuloj serĉis la blankajn pintetojn inter la verdaĵo.

„Ili floris proksime de la tranĉeoj, kaj ofte konsolis lin, li diris. Tial li volis ilin ankaŭ poste, kiam la milito pasis, kaj li edziĝis, havi en sia propra ĝardeno. . . . Kiam li revenis el la infero, la florantaj galantoj en la manoj, ni tuj devis enlitigi lin. Lia juna vizaĝo estis tiel diafana kaj pala, kiel la floroj, kiun li portis.

. . . Post unu semajno li mortis. Dum la tuta tempo la galantoj staris apud li. . . . Tio estis antaŭ kvar jaroj. Poste, kiam la plantetoj havis florojn, ni ĉiujare portis ilin al lia tombo.

Sed la antaŭan jaron kelkaj infanoj volis forpreni ilin. Mi hazarde vidis, sed nun ni ne plu kuraĝas porti la plantetojn tien. Estas kruele. Sed mi ne povus toleri la penson, ke aliaj homoj prizorgus liajn konsolantetojn. Nun ili ĉiam restas en ĉi tiu suna anguleto. Ĉi tie ili floras kviete kaj sekure”.

Ŝi remetis la poteton sur ĝian antaŭan lokon kaj reiris malsupren, ankoraŭ pli malrapide ol kiam ŝi venis. Senforte, vivlace . . .

Vojaĝo en Ameriko.

Jakobo studis kvar jarojn. Kaj kiel! Precipe dum la lastaj monatoj li laboregis. Studis eĉ nokte. Sed lia fervoro rekompenciĝis. Li sukcesis en la ekzameno.

Poste li prenis libertempon de kelkaj semajnoj, kaj klopodos akiri oficon, en la nordo, en Kanado.

Dum sia libertempo li deziris vojaĝi, por vidi ion de sia lando.

Sed kiel li povos tion? Li apenaŭ havis sufiĉe da mono por pagi siajn restadkostojn. Pri vojaĝmono li do ne povis pensi! Tio estis facila por lia amiko, la ĵurnalisto. Tiu nur eniris vagonaron, montris sian karteton kun la nomo de la ĵurnalo por kiu li laboras, kaj li vojaĝis senpage.

La vojaĝdeziro de Johano estis tamen tiom forta, ke li decidis uzi ruzon. Li marŝis al la stacidomo kaj eniris vagonaron. Li eksidis sur la molajn kusenajn.

„Vian biletan, sinjoro?“, ĝentile petis la konduktoro.

„Gazetaro“, respondis Jakobo kiam eble plej senĝene.

„Ĉu mi povas vidi vian nomkarteton?“, persistis la konduktoro.

„Mi ne havas“, estis la respondo.

„Al kiu ĵurnalo vi do apartenas?“, la konduktoro eksuspektis lin.

Senhezite Jakobo nomis la „New York-Mail“, unu el la plej konataj ĵurnaloj en la regiono.

„Tio estas hazardo!“, diris la konduktoro. „En la sekva vagono troviĝas la direktoro de tiu ĵurnalo. Bonvolu sekvi min, tiam ni aŭdos, ĉu vi diras la veron“.

Jakobo sentis, ke la lasta restaĵo de lia kuraĝo forfluas, tamen li plenumis la ordonan peton de la konduktoro, kaj kuniris.

„Sinjoro“, diris la konduktoro al riĉe vestita sinjoro, kiu legis ĵurnalon, „ĉi tiu sinjoro asertas, ke li estas ano de la redakcio de via ĵurnalo. Ĉu tio veras?“

Imagu al vi la miron de Jakobo, kiam la sinjoro respondis: „En ordo. Li estas unu el niaj kunlaborantoj“.

La konduktoro petis multfoje pardonon, kaj foriris. Jakobo eksidis en la vagono, kie sidis la direktoro. Post momento la vagonaro ekiris. De temp' al tempo Jakobo rigardis al la sinjoro, kaj pensis: „Li certe opinias min alia homo. Mi dezirus, ke mia vojaĝo jam finiĝus.“ Ankaŭ la direktoro de temp' al tempo rigardis sian kunvojaĝanton, sed li diris nenion. Tio ankoraŭ pli malkvietigis Jakobon.

Fine li ne plu povis elteni. Li iris al la sinjoro kaj konfesis kion li faris. Li humile petis, ke la direktoro ne perfidu lin.

„Oh viro”, respondis ĉi tiu ridante, „pri kio vi faras al vi zorgojn? Mi tute ne estas la direktoro. Mi vojaĝas precize kiel vi!”

Anekdoto pri Edison.

Edison montris al kelkaj personoj sian bienon en Florida. Ĉiuj tre miris pri la geniaj eltrovoj, kiujn li aplikis por ŝpari laborforton. Preskaŭ ĉio funkciis aŭtomate. Tamen estis barilo antaŭ la legomĝardeno, kiun oni nur per granda peno povis malfermi. Kiam la gastoj informiĝis pri la kaŭzo, respondis la fama inventisto: „Mi ne ŝatas, ke homoj eniras ĉi tiun ĝardenon. Nun mi ligis al la barilo pumpilon, kaj tiu, kiu tamen eniras, pumpas dum la pasado proksimume 30 litrojn da akvo por mia baseno”.

La ombro de la azeno.

Kiam Demosteno (384—322 antaŭ Kristo) foje en la juĝejo pledis por viro, kies vivo estis en danĝero, li vidis, ke liaj juĝistoj dormetas. Tuj li komencis: Aŭskultu. Juna viro luis azenon por rajdi de Athene al Magara. Sed dumvoje ĉiam pli varmiĝis, kaj nenie estis ombro. Pro tio li deprenis la selon, kaj eksidis sub la azeno, por ŝirmi sin kontraŭ la suno.

Sed kontraŭ tio protestis la posedanto de la azeno. Li asertis, ke la junulo luis la azenon mem, sed ne la ombron de la azeno. Li volis forpeli sian klienton. La junulo asertis la kontraŭon. Ili ekverelis, kaj poste interbatalis. Fine ili kune iris al juĝisto . . .”

La juĝistaro atente aŭskultis. Tiam Demosteno devenis de la podio. La juĝistoj revokis lin, kaj petis lin rakonti la finon de la historio.

„Kio?” kriis Demosteno, „pri la ombro de azeno vi deziras aŭdi pli? Kaj al la pledo por viro, kies vivo estas en danĝero, vi ne volas aŭskulti?”

Respondu al jenaj demandoj.

Kiam vivis Demosteno? Ĉu li pledis por grava afero? Ĉu liaj juĝistoj atente aŭskultis? Kiel Demosteno vekis ilian atenton? Kion li rakontis? Ĉu li finrakontis la historion? Kion petis la juĝistoj? Ĉu Demosteno plenumis ilian deziron? Kion li diris?

„Filozofio”.

La plej saĝa ĉiam cedas, diris la kamparano, kaj li foriris de la fervojo kiam vagonaro alproksimiĝis.

Servistino en iu nokto nerve envenis la dormĉambbron de profesoro, kaj diris: „Profesoro, estas ŝtelisto en la biblioteko!”
„Kaj en kiu libro li legas?” demandis la profesoro.

Dentisto al ŝtelisto: „Mono! Ne, monon mi ne havas, sed se vi volas sekvi min al mia ĉambro, tiam mi senpage eltiros kelkajn dentojn”.

Mi ŝatas, ke vi kolorigas la muron, sed kial vi tiom rapidas? Vi ja ankaŭ povas labori pli trankvile, ĉu?
Mi volas esti preta antaŭ ol la farbo-poto estos malplena!

Kia fanfaronulo.

Sveda ŝipestro, kiu ĵus revenis post longa vojaĝo, rakontis jenan historion:

Kiam ni apenaŭ forlasis la havenon de Jamaika, ni subite vidis grandan ŝarkon, kiu naĝis post nia ŝipo. Ĝi sekvis nin dum tagoj. Ni ĵetis seĝon en la akvon - la ŝarko englutis ĝin. Post kelkaj tagoj falis virino en la maron - la ŝarko englutis ŝin. Denove kelkajn tagojn poste falis kesto en la akvon, kun oranĝoj - ankaŭ tion la ŝarko englutis. Antaŭ ol ni atingis Eŭropon ni sukcesis kapti la ŝarkon. Ni malfermis ĝian ventron, kaj - jen sidis la virino sur la seĝo kaj vendis al ni la oranĝojn, 3 por 10 cendoj!

Simplaj vortoj.

Ĉiu malmulte gloru sin mem, kaj malŝatu *neniun*, ĉar *iu* diris, ke *kiu* multe scias, *tiu* ne sufiĉe scias.

Egoisto diras, ke *ie*, *kie* li sin trovas, *tie* kaj *ĉie* li estas je la dispono de siaj amikoj, sed li penas, ke *nenie* oni trovu lin.

Iel, *kiel* vi ornamis vin, vi estos tre bela; sed *ĉiel* via laboro estos senutila, ĉar la viro por kiu vi ornamas vin, *neniel* ŝatas vin *tiel* ornamita.

Al avarulo oni petis *iom* da mono. Li diris: Mi ne povas doni *tiom*, *kiom* oni petas de mi, ĉar *ĉiom* de mia kapitalo estas *neniom*.

„Kial vi aspektas tiom gaje?”

„Mi venas de la dentisto!”

„Nu, tio ne estas plezureto, ĉu?”

„Sed li ne estis hejme!”

Li transloĝis sin.

En la komenco de sia kariero la amerika humoristo Mark Twain estis tre malriĉa. En tiu periodo li renkontis sinjorinon, kiu multe subtenis junajn talentojn. Mark Twain portis cigarskatolon sub brako, kaj ŝajnis tre okupita.

„He, s-ro Twain”, diris la sinjorino tre amike. Kien vi tiel rapidas? Ĉu vi aĉetis cigarojn?”

Mark Twain konfuzite rigardis al la sinjorino, poste al la cigarskatolo, kaj diris trankvile: „Ho ne, mi transloĝas min”.

Respondu al jenaj demandoj: Kio estis la profesio de Mark Twain? Kie li loĝis? Ĉu li ĉiam estis riĉa? Kiun li renkontis en tiu periodo? Ĉu la sinjorino konis lin? Kion portis Twain? Kion demandis la sinjorino? Ĉu Twain aĉetis cigarojn? Kion li diris al la sinjorino? Kia li estis?

Tasko: 1. Laŭtlege ĉiujn rakontojn en la rubriko por komencantoj. Se eble kopiu kaj traduku ilin.

2. Notu ĉiujn vortojn, kiujn vi ne konas, kaj poste lernu ilin.

3. Rakontu per propraj vortoj la enhavon de „La Galantoj”, de „Vojaĝo en Ameriko” kaj de „Kia fanfaronulo!”

4. Lernu parkere la anekdoton pri Edison, la mallongajn ŝercaĵojn, kaj „Simplaj vortoj” (la lastan por ripeti la korelativojn).

Por ke ĉiu leganto posedu „La Vivo de Zamenhof”, ni liveras ĝin dum la monatoj februaro kaj marto por tre rabatita prezo, nome:

La esperanto-eldonon por f 1,35 anstataŭ por f 1,75.

La nederlandan eldonon por f 0,90 anstataŭ por f 1,25.

Ne prokrastu! Plenigu la suban bileton, sendu ĝin presaje al: „La Juna Vivo”, Limmen (Nederlando) kaj vi ricevos unu el la plej valoraj libroj.

Nomo:

Adreso:

abonant(in)o je „La Juna Vivo”, deziras ricevi:

.... ekz. de la nederl. eld. „Vivo de Zamenhof”

.... ekz. de la esp. eldono „Vivo de Zamenhof”

La pagon li (ŝi) samtempe sendas per poŝtmandato aŭ ĝirokonto 209354.



KORESPONDADO

S-ro C., Blankenberge (Belg.): Via artikolo pri Tervuren estas tre bona, tamen mi ne povas enpresigi ĝin. Vi levas kelkajn homojn super aliajn. Tion mi ne ŝatas. Ni ĉiuj laboris por nia propra plezuro, kaj tiuj, kiuj plej forte laboras, ankaŭ plej multe ĝuas.

Vi ankoraŭ estas juna, sed poste vi certe komprenos la malbonan influon de troa laŭdado.

F-ino F. Kr., Bergen (Ned.): Via poemo, deklamita en Tervuren, estas tre bela, sed laŭ mi ĝi ne estas tute neŭtrala; pro tio mi ne enpresigis ĝin en „La Juna Vivo”.

S-ro S., Aljustrel (Port.) skribis, ke lia amiko nuligis sian abonon al „La Juna Vivo”, ĉar li ne plu estas junulo. S-ro M., el Amsterdamo, ankaŭ malmendis la gazeton, ĉar li nun estas progresinto. Efektive estas eraro niaflanke, ke ni skribas: „La Juna Vivo, organo por la junularo kaj komencantoj”.

„La Juna Vivo” havas alian gravan taskon. Ĝi volas transpontigi la grandan distancon, kiu ekzistas inter la pliaĝuloj kaj la junularo. Ĝi volas krei la tre necesan unuecon inter la juna generacio kaj la pli aĝa, kaj tio nur eblas, se la lasta alproksimiĝas al la junularo kaj lernas profunde kompreni ĝin. „La Juna Vivo” estas do la unuigilo inter du, tri kaj eĉ kvar Esperanto-generacioj.

Krome ne forgesu, ke la junularo en la nuna tempo estas tre malriĉa kaj nur povas eldoni gazeton kun la plena helpo de la plenkreskuloj.

Al la nepagintaj abonantoj. Afable ni denove petas vin pagi vian abonon por la jaro 1940-a (kompreneble nia peto nur koncernas la abonantojn, kies abono finiĝis je 1/1 '40). Post 25 februaro ni sendos kvitancojn al la nederlandaj abonantoj. Se vi do antaŭ tiu dato pagos, vi ŝparos al ni multan laboron, kaj al vi mem la kvitanckostojn. La eksterlandajn abonantojn ni petas sendi la kotizon ĉu rekte al ni, per eksterlanda poŝt-mandato (aŭ 7 resp.kup.), ĉu al la landaj perantoj. (Vidu „L. J. V.” No. 2—3).

Varbu abonantojn por „La Juna Vivo”. Se nia abonantaro kreskas per 300, la revuo denove aperos monate !

La Esperanto-grupo en West-Graafdiijk pagis 3 abonojn, nome por :

Werner Brade, Nordhausen am Harz, Germanio ; José Solá Tornado, Moyá, Barcelona, Hispanio ; s-ro Eino Heina Harju, Ruohonpaa, Turku, Finnlando. Plue iu, kiu deziras resti nekonata, pagis por ges-roj Nordwall en Norderney, Germanujo. Kaj ankaŭ ricevos abonon Albert Biermann en Wuppertal-Barmen, Germanio.



komunikoj

Tutmonda Junularorganizo.

Internacia Junular-kunveno 1940. La 14-an de januaro la estraro de T. J. O. kunvenis en Limmen por preparoli diversajn organizajn aferojn.

Laŭ la raportoj de la ĉefperantoj montriĝis, ke nek en Francio, nek en Anglio povos okazi nia ĉiujara, internacia junularkunveno pro la nuna malfavora internacia situacio. Tial la estraro decidis, ke la int. junularkunveno 1940 okazos en la centro de Nederlando, dum aŭgusto. En la venonta numero de „La Juna Vivo” aperos detaloj pri dato, loko k.t.p. Krom la ĝenerala kunveno ni projektas ankaŭ plurajn malpli grandajn, regionajn kunvenojn. Definitiva plano jam ekzistas por semajnfina kunveno en Frislando. Detaloj sekvos.

Kunlaboro kun aliaj junular-organizoj. Ne nur estas utile, ke T. J. O.-anoj inter si aranĝu kunvenojn, sed eĉ pli grave estas, ke ili serĉu kontakton kun aliaj junular-organizoj, por propagandi nian idealon en kiel eble plej vasta rondo. Ĵus mi ricevis cirkuleron kiun nia amikino, Jenneke van Veenendaal, dissendis inter la T. J. O.-anoj en Nord-Holando. Ŝi atestas pri fruktodona kunlaborado kun aliaj junularligoj. Mi citas: „La 16-an de decembro en 1939 mi vespere iris al Bergen por viziti tie kunvenon de J. V. O. (Abstinenca Junular-Ligo). Kiam mi estis tie, mi rimarkis je mia miro, ke ne estas J. V. O.-kunveno. Ĉar tie mi renkontis grandan grupon da T. J. O.-anoj el Koedijk, grupetojn da T. J. O.-anoj el Schoorl, kaj plue estis ankaŭ grupo de N. J. N. (Nederlanda Junular-Ligo por Naturstudado) el Bergen, grupo de J. V. O. el Limmen, grupo de N. B. A. S. (Nederlanda Junular-Ligo por abstinencaj studentoj) el Alkmaar. Ni ĝuis kun junuloj el la plej diversaj junular-organizoj belegan vesperon. Kune ni (la diversaj grupoj) prizorgis la programon. Ŝercaĵoj kaj seriozaĵoj sekvis unu la alian. Kaj ankaŭ la filmo pri Tervuren formis gravan punkton en la programo. Do ankaŭ bela propagando por T. J. O.!”

Kompreneble tiu renkontiĝo de divers-organizanoj ne okazis sencele.

En la paŭzo s-ro Schuil (gvidanto de J. V. O. en Bergen) parolis pri la fakto, ke estu pli intima kunlaborado inter la diversaj idealismaj junular-organizoj. Fakte tiuj junular-organizoj havas komunan idealon, nome: „La plibonigo de la homaro”. Estus bone, se

la junulargrupoj pli sciis unu pri la alia. Tial ni sendu komunikojn pri propagandvesperoj ankaŭ al aliaj junular-organizoj. Plue oni povas kun granda grupo venigi bonajn prelegantojn.

Kun reprezentantoj de la diversaj junular-organizoj ni poste priparolis, kion ni faru en la estonto”.

La 20-an de januaro denove okazis kunveno por la divers-organizanoj. Ĝi ne havis la atenditan sukceson, ĉar nur ĉeestis partoprenantoj de la J. V. O.-sekcio Bergen, de la T. J. O.-sekcio el West Grafftdijk kaj ankoraŭ 3 T. J. O.-anoj el la ĉirkaŭaĵo. La kaŭzo de la malgranda nombro da ĉeestantoj estis la malbona, neĝkovrita vojo. Eĉ sekcioj en la tuja proksimeco ne vizitis Bergen. Estis bedaŭrinde, ĉar la prelego de s-ro Visser pri Ĉeĥoslovakio estis ege interesa. Klare li instruis al ni la historion de Ĉeĥoslovakio tra la jarcentoj ĝis la lastaj okazintaĵoj. Belaj estas ankaŭ la lumbildoj pri Praha. La demandoj kaj respondoj post la prelego ne estis signifplenaj pro manko de partoprenantoj. Tamen ni ne malesperu. Jam staras novaj kunvenoj sur la programo. Inter ili prelegvespero en kiu parolos T. J. O.-ano pri Esperanto, N. B. A. S.-ano pri la „blua” movado kaj N. J. N.-ano pri natur-historia temo. Plue ni projektis kunvenon je iu dimanĉ-posttagmezo. Promenado, kumuna vespermanĝo kaj vespere varia programo. T. J. O.-anoj ne kompromitu vian organizon kaj venu grandamase.
J. v. V.

Ni dankas niajn Nordholandajn geamikojn pro ilia iniciativo kaj esperas, ke aliaj sekvos la ekzemplon !
Floor Meydam.

Peto: Ni afable petas, ke pri ĉiuj T. J. O.-aferoj vi rilatu rekte kun la sekretario, Lingestraat 11, Leerdam, Ned., por ke vi evitu tempoperdon kaj superfluan laboron al s-ino v. Veenendaal.

„*De Esperantist'*”. Laŭ la raporto de la redaktoro de „*De Esperantist'*” montriĝas, ke la antaŭan jaron li forsendis 10.000 ekzemplerojn al la kolportantoj, tamen pro la malfavoraj cirkonstancoj la mendoj nun preskaŭ duoniĝis. Ni urĝe petas al ĉiuj energiaj homoj: helpu nin, por ke ni povu regule eldoni nian organon por ne-esperantistoj. Mendu almenaŭ 5-10 numerojn po 2 cendoj. Se vi ne havas tempon aŭ emon por vendi ilin, tiam simple disdonu ilin inter viaj geamikoj. Malgrandajn sumojn vi povas pagi per poŝtmarkoj. Nia juna redaktoro meritas vian subtenon.

Estu ne ĉiam maldiligenta ! Komprenu niajn malfacilaĵojn en la nuna tempo ! Espereble niaj fervoraj helpantoj sendos raportojn pri sia kolportad-laboro, por instrui la aliajn.

Nia gazetarservo. Nia fervora ano, s-ro Hartog en Volendam, regule prizorgas Esperanto-rubrikon en „*Levend Vischwater*” kaj „*Purmerender Courant*”. Nian koran gratulon ! Entute 5 T. J. O.-anoj nun prizorgas rubrikojn en pr. 20 gazetoj kaj ĵurnaloj. Sur tiu tereno ni multe laboru, ĉar ĝi estas tre efika kaj malmultekosta !

Filmservo. Ni prezentis la filmon pri Tervuren en 12 lokoj, kaj la filmön pri Groet en 6 lokoj. Petu informojn de la filmservo!

Donacetoj. W., Badhoevedorp: f 0.25, s-ino B., Wirdum: f 0.80.

T.J.O.-kunveno en Leeuwarden (Frislando). Ĵus ni ricevis jenan leteron:

. . . Rilate la semajnfino en Leeuwarden mi povas skribi, ke ni dum nia lasta kunveno decidis, ke nia semajn-fino okazos *la 13-an kaj 14-an de julio* en Leeuwarden. La plano estas, ke en Leeuwarden la infanoj kaj ankaŭ kelkaj plenkreskuloj, kiuj kuniros, dormos ĉe Esperantistoj. La 13-an de julio estos festvespero. La festvesperon mi prizorgos kun helpo de f-ino J. Jonker. Ĉu eble kelkaj infanoj el via regiono povos ludi teatraĵeton aŭ danci? Se jes, ili anoncu sin ĉe mi, Soendastraat 27, Leeuwarden.

F-ino E. v. Wetering kaj s-ro Koopmans zorgas pri la tranoktado. S-roj Rodenhuis kaj Strasser prizorgas la ekskurson tra Frislando la 14-an de julio. Detaloj pri la ekskurso sekvos, ĉar ni kompreneble veturos al tia loko, kie oni malmultekoste povas amuzi sin kaj ĝui la belan naturon.

La festvespero kostas 20 cendojn (kun taso da teo); la ekskurso 50—60 cendojn. Se la infanoj pagas po unu guldeno, ni eĉ povas doni lunĉon (malvarman). Ĉu tio estas tro multekosta?

Partoprenontoj anoncu sin ĉe la T.J.O.-perantino, f-ino E. van Wetering, Schalkburgerstraat 10, Leeuwarden. Ankaŭ sufiĉas, ke oni klare menciu la aliĝon sur la ĝirobiljeto, pagante la kotizon en la poŝtĉekkonton n-ron 62082 je la nomo de s-ro J. Melis, Soendastr. 27, Leeuwarden.

Kun samideana saluto, M. C. Strasser—Melis.

Laŭ mi nia frisa T.J.O.-grupo bonege aranĝis la aferon. Ankaŭ la sumo de unu guldeno por tuta semajnfino ne estas tro alta.

El Nord-Holando ni aranĝos aŭtobuskaravanon, nur por T. J. O.-anoj. Estas la devo de ĉiu membro helpi sukcesigi tiun feston. La aŭtobuso kostas p. f 1.50—f 2.—.

Ek al la laboro!!!

La estraro de Tutmonda Junular-Organizo deziras al ĉiu prosperan novjaron.

KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en jaro senpagan korespondadreson, ne pli grandan ol du linioj.

Belgujo : Mi deziras korespondi kun gejunuloj el ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj. Mi estas 18-jara studento. De Bondt Ray, Amsterdamstr. 86, Oostende.

Francujo : S-ro René Viguié, 19-jara, Montredon par Bagnac (Lot) dez. kor. kun ĉiuj landoj. Interŝanĝas pm. kaj esp. gazetojn. Respondo garantiata.

Germanujo : Kahlau Franz, Bromberg, Fischerstr. 14, dez. kor., interŝanĝi poŝtm., il. poŝtkartojn kaj monerojn.

Hispanujo : Mi petas al miaj antaŭaj gekorespondantoj pardoni min pro mia longa silento. Mi dez. daŭrigi la koresp. kaj ankaŭ kor. kaj interŝ. let., il. pk., pm. kun ĉ. l. Jos. Marti, Rozas, Perona.

Nederlando : 17-jara f-ino dez. kor. kun ĉiuj landoj. Respondo certa. Trynie Kuiper, Valkoog, St. Maarten (N. H.).

Francujo : S-ro Carlos A. da Rocha Leal tre ĝojus ricevi novaĵojn de s-ro A. Ferreira en Lisbono (Port.). Depost oktobro 1938 li ne ricevis respondon je pluraj leteroj, eĉ ne je unu registrita kun ricevatesto. La ricevateston subskribis s-ino Maria Fernanda Vivo anstataŭ s-ro Ferreira. Jen la nova adreso de s-ro Da Rocha: 15 rue Faidherbe, Somain (Nord), Francujo.

Usono : Senpaga korespondo-servo por geskoltoj kaj aliaj gejunuloj. „Estu Preta”, nova Esperanta instru-gazeto por Usonanoj, dez. adr. de eksterlandaj gejunuloj por sia korespondo-servo. La nura kondiĉo estas frua respondo al ricevita korespondado. Ni prizorgos, por ke oni ne ricevu pli ol la deziratan nombron da komunikadoj. Sendu klare skribitajn adresojn al: „Estu Preta”, Winchester, Illinois, Usono. Poŝtkarto sufiĉos.

Nederlando : Konduktoro ĉe la Ned. Forvojo dez. kor. kun ĉiuj landoj. Ĉu letere, ĉu poŝtkarte. Respondo garantiata. H. Hottinga, Primulastraat 8, Amersfoort.

Nederlando : J. Miedema (12-jara knabo), Duin en Bos 11, Bakkum (N.H.).

” T. Buurmeyer (15-jara f-ino), Duin en Bos 24, Bakkum (N.H.).

” Frisa Esp. Rondo aranĝas letervesperon. Adr.: Arumerstraat 39, Leeuwarden.

Svedujo : Letervespero de Svensbro-Burgunda Esp. - Klubo. Adr.: Einar Storm, Borgunda Skultorp.

” Poŝtkartvespero. Skribu amase al: Motala Esp. Klubo. Adr.: Carl Hallros, Bispotala Handelsträdgård, Motala.

” Letervespero. Esp. - Klubo en Olofström. Adreso: s-ro Bernard Jönson, Box 42, Olofström.

Brazilo : Diversaĝaj gekursanoj deziras korespondi kun la tuta mondo per ilustr. poŝtkartoj. Skribu multnombre! S-ro Mario Rodriguez, Strato General Glizerio 357, Santo Andre (Ŝtato S. Paulo).

Latvujo : Voldemaro Rozentals, 37-jara librotenisto, Andreju ostà N 1—5, dez. kor. kun ĉiuj landoj. Respondo certa. Ne interŝanĝas poŝtmarkojn.

Nederlando : Juna flegistino dez. kor. kun ĉiuj landoj. Adr. S. Holskamp, St. Rozenburg, Loosduinen.

„ Juna sinjorino dez. kor. kun ĉiuj landoj. Adr.: S-ino N. Bankersen, Oost-Graafdyk (N. H.).

Bulgarujo : Mi deziras koresp. kun ĉiulandaj esperantistoj pri ĉiuj temoj. F-ino Vasilka Modera (18-jara), Osenova, Nevrokopsko.

Hispanujo : Por propagandi Esperanton, sendu al mi Esperantaĵojn, il. pk., leterojn ktp. Kompense vi ricevos il. pk., poŝtm. ktp. el Hispanujo. R. Molera, Str. Hospital 13, Moyà (Barcelona).

Danujo : Juna viro (21-jara) dez. kor. Peter Sørensen, „Ly”, Stiftelsesvej, Odder.

Svedujo : R. Pehrsson, Kungsgatan 56, Stokholm, deziras korespondi.

„ Lars Bodin (16-jara knabo), Box I, Leksboda, dez. interŝ. ilustr. poŝtk. kun geknaboj el ĉiuj landoj.

Norvegujo : S-ro Johan H. Rosbach, 18-jara gimnaziano, Ole Jullumsgate 13, Kristiansund, dez. kor. kun samaĝaj gejunuloj.

Usono : S-ro Louis Dormont, lernejestro, Public School, St. Albans (N.Y.), dez. por siaj 35 gelernantoj (12-j.) korespondadon kun ĉiuj landoj.

Francujo : S-ro R. Lefebvre, 10 rue Jean Villemin, Champigny (Seine), dez. kor. kun ekstereuropaj landoj.

Rumanujo : S-ro Zoltano Nagy en Gara Soimi (jud. Bihor), gimnazia studento, dez. kor. Certe respondos.

Usono : F-ino Helen Morton, East Orange (New Jersey), Vernon L. Davey Junior High School, serĉas korespondantojn por siaj gekursanoj (infanoj kaj plenkreskuloj).

Nederlando : La infangrupo en West-Graafdyk (11/15-jaraj) dez. kor. kun ĉiuj landoj. Adr.: F-ino N. Kool, No. 112, West-Graafdyk (N. H.)

Kimrujo : 20 gekursanoj dez. kor. kun ĉiuj landoj. Resp. certa. S-ro H. C. Hancock, 16 Alexandra Terrace, Brunmill, Swansea.

Nederlando : Berta Wit, 12-jara knabino, dez. kor. kun samaĝaj geknaboj. Adr.: West-Graafdyk (N. H.).

„ Dick Broekhuis, 12-jara knabino, West-Graafdyk (N. H.), dez. korespondi kun samaĝaj geknaboj.

Anglujo : Kiu instruisto dez. grupkorespondadon inter siaj klasanoj kaj miaj? Aĝo: 15-19 j. Unujara, dujara kaj trijara lernado. Adr.: S-ro H. Morcombe, 30 Beech Rd., Bourneville, Birmingham.

Nederlando : Dick Spek, 12-jara knabo, deziras korespondi kun geknaboj en ĉiuj landoj. Adr.: West-Graafdyk (N. H.).

Francujo : Kursanoj 18-jaraj deziras kor. kun ĉiuj landoj. Skribu al s-ro Calvin, Ecole Normale d'Instituteurs, Aix-en-Provence.

Jugoslavujo : M. Ĝordeviĉ, Daniĉičeva 17, Kragujevac, dez. interŝ. kaj korespondi kun ĉiuj landoj.

Nederlando : Fraŭlo 22-jara dez. kor. letere kun ĉiuj landoj. Responde certa. S. Kos Azn, Callantsogervaart 35, Post 't Zand (N.H.).

„ T.J.O.-grupo (15-17 j.) deziras kolektive korespondi kun ĉiuj landoj. F-ino E. v. Wetering, T.J.O.-perantino, Schalkburgerstr. 10, Leeuwarden.

Portugalio : 22-jaraĝa fraŭlo dez. kor. kun ĉiuj landoj. Adreso: José Rosa Caetano, Torrão.

Anoncetoj (30 c. por ĉiu linio).

KALENDARO POR 1940. Sendu al viaj gekorespondantoj Kalendaran Poŝtkarton por 1940. — Klarlegebla, dukolore presita sur bona kartono, ĝi estas ŝatata donaco, kiun la ricevinto volonte uzos tutan jaron; tial ĝi estas unu el la plej taŭgaj kaj malkaraj propagandiloj. — Prezo afrankite: 20 ekz. por hgld. 0,40; 100 ekz. por hgld. 1,76. Specimene 5 ekz. por hgld. 0,12⁵ aŭ unu resp.-kup. H. E. O., Abcoude, Holland, Poŝtkonto 88015.

La Ĵurnalo „LE TRAVAIL” jam dum 6 jaroj ĉiusemajne enpresigas esp. rubrikon. Jarabono 24 belg. fr. Petu senpagan specimenon! Kunlaborado estas petata. Adr. red.: Jean Kairis, 40 rue de Stembert, Verviers, Belgujo. Ĝirkonto 147723.

SKRIBA ESPERANTO-KURSO por komencantoj (nur por holandlingvanoj). Belaspekta, ilustrita lernolibreto kaj 16 ciklostilitaj lecionoj. Senpaga korekto. Prezo nur 95 cendoj.

SKRIBA ESPERANTO-KURSO, preparanta por diploma A (nur por holandlingvanoj) 25 lecionoj, lego-lernolibreto, historilibreto, multe da buŝaj kaj skribaj ekzamen-problemoj. Senpaga korekto. Prezo f 1.95. Eld. „La Juna Vivo”, Limmen (N.H.), Nederlando.

TUTMONDA MOVADO. Vi ankoraŭ ne konas tiun movadon por ĉiuj homoj de bona volo? Tuj petu informojn de s-ino E. v. Veenendaal—Bouwes, Limmen (N.H.), Nederlando.

BINDITAJ JARKOLEKTOJ „La Juna Vivo” (1-a, 2-a aŭ 3-a jaro). Amaso da legaĵo, ŝercoj, enigmoj, kantoj, ktp., por nur 35 c. plus afranko!

FRATECO: En tagoj, kiam la homaro estas preta droniĝi en la maro de la egoismo, en tagoj kiam la sanktaj ideoj pri Paco kaj Frateco inter homoj kaj popoloj kvazaŭ estingiĝas, la esperanta gazeto „Frateco” estas lumturo en la furiozanta oceano de la vivo. Samideanoj, helpu ĝin kaj ĝian laboron. Jarabono 0.40 guld. Abonebla ĉe „La Juna Vivo”. Petu senpagan specimenon de „Frateco”, Sevlievo, Bulgarujo.

INTERNACIA LERNOLIBRETO „La Juna Vivo”, 2-a eldono. Belaspekta, ilustrita libreto. Enhavo 16 lecionoj. Prezo nur po 20 c. plus afranko. Rabato ĉe grandaj meŝoj.

TUTLANDA ESPERANTO-OFIGEJO en Danujo. Danlando nun dank' al kelkaj fervoraj kaj oferemaj gesamideanoj havas tutlandan Esperanto-centron. La oficejo situas en la urbo Ringsted (Selando) kaj ĝi havas ĉiajn fakojn rilate Esperanto-servon. La oficejo eldonas la gazeton „Dansk Esperanto-Tidende”. Oni petu tuj specimenon de tiu bele eldonita gazeto! Adr.: Tinggade 10, Ringsted, Danujo.

LA XII-A NEDERLANDA ESPERANTO-KONGRESO de „La Estonto Estas Nia” okazos la 23-an, 24-an kaj 25-an de marto, do dum la Pasko-tagoj, en Arnhem, en la salonoj de „Maison De Bruyn”. La programo estas tre alloga. Petu informojn kaj aliĝilon al la sekretariino de la L. K. K., f-ino A. H. Kramer, Kluzeweg 40, Arnhem.